

& Ne la amo:

< Ripete 22 sed rekante 14 el 43 batoj por strofo, entute 430 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis (kaj komponis) Grigorij Arosev. Baladigis Martin Strid (2015) per melodio de Mikis Theodorakis kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

/dodo SoSo LaTi dodo; TiLa SoFa MiRe Do o; dodo SoSo dore mimi; (fa re mi do relfa milre do)×2 o

(#Rekantaĵe:; mimi mimi mimi mimi; misofami famiredo re; rere rere rere rere; refamire miredoTi do o)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Ne la amo sed la febro, ; Trankviliĝo sed ne ŝtorm', ; Ne animo sed algebro, ('; Ne pasi' sed nu2ra2 form'.) (,: Ne pasi' sed nu2ra2 form'.)

(×: **Tamen paŝu, triston kaŝu ; Venu kun ni danci en la ĉen' ; Viva nervo, vera vervo ; Vigle paŝu en la danco jen!**)

'2 Ne la kuno sed la solo, ; Ne kontakt' sed miskompren'. ; Kaj anstataŭ viva bolo ; Marĉo kaj droniga splen'.

'3 La kandelo jam forbrulis, ; Tuta viv' vaksiĝis jam, ; Kaj la vivo respegulis: ; Estas febro sed ne am'.

'4 Apud vi mi estas fremda, ; Kaj penetras min malpur', ; Mankas fortoj por atendo ; De alveno de plezur'.

'5 Ankaŭ mi ne havas fortojn ; Por plu firmu mia brak'. ; Kaj anstataŭ manĝi tortojn - ; Suĉi akvon el kloak'.

'6 La kandelo jam delonge ; Sin ekstermis pro ĉagren', ; Kaj anoncis vento gonge ; Ke ne estas kun', sed sen'.

'7 Certe vi ne vi jam estas, ; Ankaŭ mi ne estas mi. ; Nia amo ĉerke keŝtas, ; Anstataŭas ĝin kemi'.

'8 Ne plu estas mi naiva. ; Pro foresto de la halt' ; Nekredeble tedis vivo - ; Ĝi similas al asfalt'.

'9 La kandelo ploras gute ; Kun neniu perspektiv'. ; Kaj forfluas pominute ; Tra la fingroj nia viv'.

'10 Ne la amo sed la febro, ; Trankviliĝo sed ne ŝtorm', ; Ne animo sed algebro, ; Ne pasi' sed nura form'.